
BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



# Sonorilo

57a jaro n° 3

majo - junio 1965

# Sonorilo

oficiala dumonata bulteno de B.E.F.

**Redakcio:** Jaumotte Maurice
Roose Fernand, Sint-Klaradreef 59, Brugge — tel. (050) 319.81
Maertens Grégoire
Poupeye Charles

**Kunlaborantoj al regulaj rubrikoj:**
Dr. Pol Denoël
Durwael Ivo — Iserentant Roger — De Cuyper Georges

**Administrado:** Terryn J. Raapstraat, 72 Gent

Belga Esperanto-federacio

**Asocio sen profita celo** — **Sidejo & prezidantejo**
Debruynlaan 44, Wilrijk — tel. (03) 377758

**Honora prezidanto**
Kempeneers Paul

**Honora vicprezidanto**
Sielens Henri

**Ĝenerala prezidanto**
Jaumotte Maurice

**Prezidantoj**
Debrouwere Gerard, Magdalenastraat 29 Kortrijk
Dro Denoël Pol, 20 Rue V. Raskin Liège

**Unua vicprezidanto**
Roose Fernand

**Vicprezidantino fakestrino por kongresoj**
Plyson J. 23, Placo E. Flagey, Bruselo 5 p.k. 236804

**Vicprezidanto fakestro pri teknikaj rimedoj**
Verstraeten Jules, Sint Bernardse Steenweg 1078 Hoboken

**Sekretario por la nederlandlingva regiono**
Maertens Grégoire, Prins Leopoldstr 51, St-Kruis tel. (050) 34935

**Sekretario por la franclingva regiono**
De Cuyper Georges, 66, Rue de Dorlodot, Monceau sur Sambre

**Kasistino** Terryn Juliette, Raapstraat 72, Gent

**Poŝtkonto de B.E.F.: 1634.34 Raapstraat, 72, Gent**

**Ĉefdelegito de Universala Esperanto-Asocio**
Fr. Schellekens, Frans Hensstraat, 44, Antwerpen 2
p.k. 9051.25

Belga Esperanto-federacio

# Oostende

## 47-a kongreso de B.E.F. — 5-6-7/6/1965
## 4-a markola kongreso
## Pentekosto

| **ADRESO POR KORESPONDADO** |
|---|
| **Maertens G. Pr. Leopoldstraat, 51, Sint-Kruis (Belgujo).** |

Kongresejo: FEESTPALEIS (Festpalaco), Wapenplein, Ostendo

**PROGRAMO**

SABATO 5.6.1965

14.00 h : Malfermo de la AKCEPTEJO kaj de la kongresgiĉetoj en la kongresejo.
15.00 h : Malfermo de la **ekspozicio** kaj **gazetara konferenco** (halo de la Festpalaco) en la ĉeesto de la delegitoj de la kulturaj asocioj.
Enkondukaj vortoj ĉe la malfermo de la ekspozicio :
La ĝenerala Prezidanto de BEF, **S-ro M. Jaumotte.**
Gvidantoj de la gazetara konferenco :
La Prezidanto kaj Vicprezidanto de la LKK, **S-roj Marmenout A.** kaj **Poupeye Ch.**
16.00 h : Kunsido de la **Administrantaro** de BEF en salono Witteryck.
19.30 h : **Oficiala Malfermo** komune por la du kongresoj en la salonego Zamenhof :
Enkonduka parolado S-ro Marmenout A., Prezidanto LKK.
Salutoj de la junularo
Salutoj de la oficialaj reprezentantoj
Salutoj de la delegitoj de la Brita, Franca kaj Nederlanda kongresanaro
Salutoj de la grupoj de BEF
Festparolado, S-ro M. Jaumotte.
Varia vespero sub gvidado de S-ro A. Dumarey, kun la kunlaborado de la junulargrupo, universitata grupo, S-ro Weber.
Konkurso pri klereco kaj lerteco.
Vizito al la Skolta tendaro, Albert-Hall (Stacidomo).

DIMANĈO 6.6.1965

9.00 h : Malfermo de la giĉetoj kaj de la ekspozicio **Kunsido de B.E.J.A.** en la salono Witteryck.
10.00 h : Fermo de la giĉetoj.
**Kunsido de BEF** en la salonego Zamenhof.
**Kunsido de la Markolanoj** en la salono Witteryck.
Ek de la 11-a horo, komuna kunsido dediĉita al la jaro de la INTERNACIA KUNLABORADO.
12.00 h : **Akcepto** de la kongresanoj en la urbdomo.
Poste, komuna **fotografado** sur la ŝtuparo.
Fermo de la ekspozicio.
15.00 h : **La Junularo** vizitas Oostende per vagonareto.
15.30 h : **Vizito** al la muzeo de belaj artoj (Festpalaco) sub gvidado de S-ro Drs Roose F., Vicprezidanto LKK.
17.00 h : **Boatekskurso** de unu horo : forvojaĝo de la ĝeto.
18.45 h : **Katolika Diservo** en la preĝejo de la Kapucenoj, Kapucienenstraat, proksime de la Festpalaco.
19.30 h : **Bankedo** en la Festpalaco.
21.00 h : **Balo**.

LUNDO 7.6.1965

9.30 h : **Tuttaga ekskurso** al la Bruĝa regiono per aŭtoĉaro kaj aŭtokaravano sub gvidado de S-roj Maertens kaj Roose.
Vizito al la muzeo de Permeke (Jabbeke).
Vizito al la grenejo Ter Doest kaj manĝo.
Damme — Grafa Kastelo de Male.
Fermo en « SCHUTTERSHOF » Sint-Kruis (malvarma lunĉo)
Reiro al Ostendo.

**LISTO DE GEPARTOPRENANTOJ**

91 S-ro L. Demesmaeker, Aalst
92 S-ro L. Legros, Lille-Nord
93 S-ino L. Legros, Lille-Nord
94 S-ro S. Denoël, Luik
95 S-ro F. Couwenberg, Blankenberge
96 S-ino Couwenberg, Blankenberge
97 F-ino A. Geelen, Deurne
98 S-ro A. Heck, Jalhay-Verviers
99 S-ro R. Buerick, Calais-Francujo
100 S-ino R. Buerick, Calais-Francujo
101 F-ino E. De Coene, Ekeren
102 F-ino H. De Coene, Ekeren
103 S-ro G. Ghysels, Haaltert
104 S-ro M. De Wit, Erembodegem
105 F-ino M. Schandewijl, Denderhoutem
106 F-ino R. Mauchien, Amiens - Francujo
107 S-ro Gian Carlo Fighiera, Brussel
108 F-ino M. Noynaert, Aarschot
109 F-ino G. Noynaert, Aarschot
110 F-ino A. Verstrepen, Aarschot
111 F-ino C. Claes, Aarschot
112 F-ino G. Leibovitche, Antwerpen
113 S-ro A. Vande Velde, Gent
114 S-ino A. Vande Velde, Gent
115 S-ro F. Ditacroute, Calais - Francujo
116 S-ino F. Ditacroute, Calais - Francujo
117 S-ino Lauwers, Assebroek
118 S-ro G. Verbeke, Brugge
119 F-ino Y. Van Parys, St.-Andries
120 S-ro M. Poupeye, Brugge
121 S-ino M. Poupeye, Brugge
122 S-ro A. Janson, Châlons-sur-Marne
123 S-ino R. Vyncke, Brussel
124 S-ro E. Woessink, Arnhem Nederlando
125 S-ino E. Woessink, Arnhem Nederlando



125 S-ino E. Woessink, Arnhem Nederlando
127 F-ino Opsomer S., Bruxelles
128 S-ro D-ro Mildwurf Abraham, London - Anglujo
129 S-ino Hartridge, Addisconbe Croydon, Surren, Anglujo
130 S-ro P. Waite, Bromley - Kent
131 F-ino K. Waite, Bromley - Kent
132 Sinj. Venture, Sutton - Surrey, Anglujo
133 Sinjorino Venture, Sutton - Surrey Anglujo
134 F-ino Gentry Jessie, Sutton - Surrey, Anglujo
135 S-ro Green, Greenford, Middlesex, Anglujo
136 Sinj. Green, Greenford, Middlesex, Anglujo
137 S-ino Waring, Bexleyheath, Kent, Anglujo
138 S-ro Atkinson, Acton London W.3, Anglujo
139 S-ino Atkinson, Acton London W.3, Anglujo
140 S-ino Trilby Markarian, Herne Bay, Kent, Anglujo
141 S-ino Aldridge, Lewes - Sussex, Anglujo
142 S-ro West, Deal, Kent, Anglujo
143 S-ino West, Deal, Kent, Anglujo
144 S-ro Watts, Margate Kent, Engl.
145 S-ro Rogers Frans, Ilford, Essex, Anglujo
146 S-ino Martens-Terryn, Oostende
147 S-ro Martens-Terryn, Oostende
148 S-ro Jacques Martens, Oostende

**ALDONIS SUMON POR LA INFORMADO**

Sino. LECAT Antwerpen 50 fr. — Finoj. DE COENE Ekeren 25 fr. — Fino. MAUCHIEN Amiens-France 50 fr. — Sro. Gian Carlo FIGHIERA 25 fr. — Sino. BERNAERTS-TOUSSAINT Wilrijk 50 fr. — Fino. GEERS Blanche Antwerpen 50 fr. — Gesinjoroj VAN EYNDE Wilrijk 20 fr. — Sino. MEURRENS Leuven 20 fr. — Finoj. HENQUINEZ Leuven 25 fr. — Gesinjoroj DITACROUTE Calais-Francujo 25 fr. — Gesinjoroj MARMENOUT Blankenberke 25 fr. — Gesinjoroj BOFFEJON Brasschaat 25 fr. — Finoj MOYNAERT Aarschot 25 fr. — Gesinjoroj Van de Velde Gent 25 fr. — Fino TERRYN Gent 25 fr.
ENTUTE 465 fr. + 420 (antaŭa listo) = 885 fr.

Kaj Ankoraŭ Alvenas Enskriboj...

Angloj, Francoj, eĉ Hungaro !

LA INTERNACIA ATMOSFERO ESTAS CERTIGITA !

## ALVOKO

Ciutage dekmiloj da personoj venas labori en Bruselo el ĉiuj regionoj de Belgio. Multaj inter ili kaptas la okazon de libera tempo post la tagmanĝo por promeni, trinki kafon aŭ renkonti amikojn; vespere ili ne povas fari tion, ĉar estante for de sia familio dum la tuta tago, kaj estante lacaj pro la vojaĝoj ĉiutagaj, ili preferas ripoze resti hejme kaj ne partopreni en la socia vivo de la organizaĵoj en la hejmloko.

Inter tiuj personoj certe estas multaj kiuj konas Esperanton, sed kiuj pro la cirkonstancoj ne havas la okazon regule vizite la lokan Esperanto-grupon por praktiki la lingvon. Kial ni ne donu al ili la okazon praktiki la lingvon tagmeze post la tagmanĝo ĉe taso da kafo ? En Bruselo tagmeze kunvenas dum kelkaj minutoj entuziasmuloj de multaj fakoj. Kial do ankaŭ ne de Esperanto ?

Mi proponas ke je iu tago de la semajno en iu konvena trinkejo ekzistus la okazo por renkonti amikojn kaj dum kelkaj minutoj interbabili. Al tio kompreneble ankaŭ povus partopreni la bruselanoj kaj la hazarde en Bruselo estantaj eksterlandanoj. El tiuj nekonformaj renkontoj povus kreski interesaj kontaktoj de kiuj multaj lokaj grupoj povus profiti. Krome tiuj renkontoj povus havi bonan propagandan valoron. Ili montrus kiel flandroj kaj valonoj ne renkontas lingvan obstaklon en Bruselo.

Personoj kiuj havas proponojn aŭ simpatiojn pri ĉi tiu ideo estas petataj kontakti kun Sro W. de Smet, Hendrik Meyslaan 9, Deurne.

# BEJA

**AKTUALA ! RILATOJ KUN AFRIKO.**

Nia sekretariino, Jeannine Chaineux, jam varbis plurajn Afrikanojn por la Internacia Lingvo. Pasintan jaron kaj ankaŭ nun, ŝi gvidis kaj gvidas kurson por Afrikanoj kiuj studas en la universitato de Liège. Sed ankaŭ per korespondado ŝi akiris kelkajn belajn rezultatojn. Ŝi konsilas agi jene :

Unue vi korespondu franclingve kaj baldaŭ vi fariĝos la amiko de via korespondanto. Nur poste vi klopodu veki interesiĝon por Esperanto. Tre verŝajne vi sukcesos konvinki vian amikon pro simpatio al Esperanto kaj al vi mem.

Kuraĝigaj rezultatoj certe ne forrestos ! Jeannine povas rakonti multon pri siaj spertoj. Ŝi ĉiam havas adresojn, ankaŭ por vi !

Skribu al J. Chaineux — 10, rue des Plantes - Verviers.

**NI PETAS KUNLABORON !**

Peto por rekoniĝo kaj subvenciado per la Nacia Servo por la Junularo estas forsendita, kun multaj subskriboj de eminentaj junulargvidantoj. La ĝenerala direktoro ne jam respondis, sed ni tamen estu pretaj por pruvi la aktivecon de la Esperantista Junularo. Tial mi petegas sendi ĉiujn ajn informojn kaj dokumentojn (anoncojn, raportojn, gazetartikolojn...) pri junularaj aŭ por-junulaj aranĝoj. Nia dokumentaro daŭre dikiĝas !

Sendu ĉion al Ivo Durwael - Dolfijnstr., 77 - Antwerpen.

**BEJA KUNVENOJ.**

Post la bonege sukcesinta renkonto en Liège kaj Visé (24-an kaj 25-an de oktobro) 1964, ni daŭrigis la serion :

28-a de nov. : loka renkonto en Antwerpen
19-a de dec. : Junulara Festo en Liège
27-a de dec. ĝis 3-a de jan. : Seminario en Nürnberg (Germanio)
marto : semajnfino en Namur
aprilo : renkonto en Leuven.

**KOTIZOJ.**

Ĉiu membro de BEF, ĝis 25-jara estas **aŭtomate** membro de BEJA. Ankaŭ vi do pagu vian kotizon ĉe la kasisto de via grupo, aŭ rekte al F-ino Terrijn. Sed por certe ricevi ĉiujn informojn vi tamen informu vian vic-prez. pri via aniĝo :

por Flandrio : Ernest Lernout - H. Kruissstr., 11 - Mortsel
por Valonio : Serge Denoël - 20, rue V. Raskin - Liège.

**7 DIPLOMITOJ — 5 GEJUNULOJ !**

La 25-an de januaro finiĝis denove elementa kurso de la Verda Stelo. Inter la 7 diplomitoj, 5 estis malpli ol 25-jaraj ! F-ino Agnes Geelen havis plej bonan rezulton, kaj gajnis **senpagan kongreson en Oostende**. La aliaj gejunuloj estis : S-ro Van Gulck, F-ino De Prins, F-ino Van Gulck kaj F-ino Thibau.

Ivo DURWAEL.



# KRUCVORTENIGMO


**SOLVO DE LA PROBLEMO N° 13**

| | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| E | K | T | O | P | L | A | S | M | O |
| G | E | O | M | E | T | R | - | A | F |
| A | D | M | I | R | A | L | I | G | I |
| L | - | B | - | I | R | - | S | I | C |
| A | V | E | - | K | - | D | - | - | I |
| N | A | J | B | A | R | U | R | B | A |
| I | S | - | - | R | - | - | O | A | L |
| M | A | K | A | D | A | M | I | Z | I |
| E | L | T | R | O | V | I | - | I | G |
| C | E | N | T | J | A | R | I | G | I |

Ensendis solvojn : el Antverpeno : Sro. Henri De Hondt, S-ino. J. De Hondt, Sro. J.R. Van Eynde, F-ino. E. De Coene ; el Brugô : F-ino. M. Willems, Sro. R. Iserentant ; el Bruselo : S-ino. J. Plyson, F-ino. S. Opsomer, S-ino. E. Ernst ; el Lieĝo : S-ino. Montelet-Soyeur ; Sro. Lemme.

Lotumado havigis la libropremion al Sro. R. Iserentant.

## No 14



**DIFINOJ**

HORIZONTALE :

1) **Esperanto jam ofte estis .........**
2) **demandas aŭ rilatas pri nenomita objekto — komencaj literoj por : nia estonta tutmonda financoficejo.**
3) **flavbruna farb' — emblem'**
4) **duono de negr' — havi**
5) **L + ...... = inklino por altiri — Afrika land'**
6) **Kiu impresas la flarsenton kiel sudaj floretoj.**
7) **optimisma erar' — inversigita pronomo.**
8) **malvigliĝi pro spirita laboro.**
9) **kondiĉe ke — nesincere dolĉa.**
10) **Mezepokaj poetoj.**

VERTIKALE :

1) **Sciencist' pri riĉajoj.**
2) **Rimed' por ŝveligi — partet'**
3) **person' kiu atente penadas.**
4) **...... + IKO = Afrika lando.**
5) **Kiu koncernas publika(n) elmontrado(n).**
6) **iu objekto — hinda sankta libr'**
7) **komencaj literoj por : ano kiu pagas iom pli — batalu.**
8) **malgranda amaso de akvovaporo — neologismo por maloft'**
9) **Nom' de Ostrogota kaj Vizigotaj reĝoj.**
10) **Valorpaperoj.**

N.B. 1) La apostrofo (') post difino, aŭ post in vorto de la difino, montras ke nur la radiko estas enskribota, do sen finajo.
2) La solvo, aperos en la sekvonta numero, kun mencio de la solvintoj, inter kiuj libropremio estos ellotata.
3) Sendu NEPRE vian solvon al: Ch. Poupeye, Elf Julistraat, 11, Brugo, dum la 10 unuaj tagoj post la apero.



# ECENZOJ

**« 33 Rakontoj » eldonis « Stafeto » sub direktado de Prof. J. Regulo en la Kanariaj Insuloj. 332 + XX paĝoj. Jaro 1964. Eldonkvanto : 2.000. Prezo : broŝ. 3 Us. Dol.; tolbind. 3.80 Us. Dol.**

La libro komencas per mallonga literatura studo de la konata Jugo-Slava literaturisto Ivo Rotkvič. Sekvas du prezentoj, de F. Szilagyi kaj de R. Rossetti. Kaj tiam la kolekto da noveloj.

Kia vario laù enhavo ! Vi kiuj ŝatas legi bonajn rakontojn ; kaj vi kiuj iom pli art-eme ŝatas bonan kaj belan prozon ; kiuj eble iom kritike legas kaj volas kompari, kaj volas sekvi evoluon ; por vi ĉiuj, jen la ideala libro.

Legante tian libron oni konsciiĝas ke nia literaturo jam havas historion kaj ke ĝi evoluis ĝis la rata nivelo. Jen la granda merito de tia publikigaĵo. Pri supra aserto vi ne dubos kiam vi legos nomojn de kontri buintoj: R. Schwartz, J. Baghy, F. Szilagyi, Marjorie Boulton, H. Baupierre, mallonge, ĉiuj niaj « granduloj » kun ilia apartaj stilo, karaktero, rakontmaniero. Ni konsciiĝas ankaù ke sole la mencio de kelkaj inter ili jam instigos vin al aĉeto kaj legado. Faru senprokraste. Per tio mi certe ne volas diri ke ĉiuj prozaĵoj tie-ĉi estas egalvaloraj aù egalartaj. Multe pli ol en poezio vi kapablos distingi tiujn kiuj serĉas, klopodas trovi vortkombinojn kaj ... malsukcesas. Iliaj frazkonstruoj estas torditaj; kaj ili diras banalaĵojn... Ili ne estas artistoj. Kaj relative facile vi trovos la verajn talentojn... kiuj kapablas esprimi; iliaj vortoj estas la ĝustaj vortoj; iliaj frazoj fluas... kaj trafas ! Tiujn kvalitojn ni trovas ĉe Schwartz, M. Boulton. Ankaù ĉe la nova talento H. Baupierre, kiu vere havas grandan talenton por verki. Mi tamen devas diri ke la prozaĵo de M. Boulton ne estas de ŝiaj plej bonaj. Kial oni ne elektis « Ebrivirgeco » kiun mi trovis en « La Nica Literatura Revuo » kaj kiu estas eksterordinara laù psikologio kaj laù vort-arto. Ĝi estas unu de la ĝis nun malmultaj prozaĵoj kiuj pruvas ke, kiel en la naciaj lingvoj, tiel ankaù en Esperanto ekzistas vortkonstruoj ideaj (kaj ne nur laùformaj kaj senenhavaj) kiuj estas ne tradukeblaj en aliaj lingvoj sen ĉirkaùpriskriboj. Ne estas loko tie-ĉi por priparoli ĉiujn rakontojn. Mi tamen ne povas rezisti al la tento por diri ke « Doktoro Nekelmo » estas tragedio... pri kiu mi multe ridis ! Sed mi ne dubas ke in illo tempore la legantoj tre ŝatis ĝin. La gustoj je ŝanĝiĝas. Kaj restas la fakto ke en tiu komenca periodo de nia lingvo Esperanto jam estis plenvalora lingvo, kaj ne iu nura kodo. Al la paĝo de korektendoj mi devas aldoni unu: antaùlasta frazo sur paĝo 62, siaj devas esti liaj. De ĉiuj aùtoroj troviĝas biografieto sur la lastaj paĝoj. Ne malmultaj inter ili jam mortis. Ili nun iusence revivas je legado de la libro ; kaj ni danke rememoras ilin pro kion ili faris por la movado kaj por la lingvo kaj por la neperecebla literatura monumento kiun ili postlasis al ni

Drs. F. Roose



P. V. B. A.

FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken

Vitraloj – Speguloj –
„securit" vitro
kolorigitaj vitroj
aluminiaj senmastikaj
stangoj por kupoloj

Vitro cementoj por
tutvitra-konstruaĵoj
mastiko

telefono 37.88.20

**Gösta Henriksson : « El la vivo de Ludoviko Zamenhof ». 16 paĝa broŝureto; teksto: dek kaj duona paĝoj. Eldonis: Eldona Societo Esperanto en Malmö. Prezo: ne indikita.**

En la enkonduko la aùtoro diras ke ankaù la komencantoj devas ekkoni la figuron de la majstro, kvankam ili estas ankoraù en la tempo ke ili ne kapablas legi la grandajn biografiojn pri Zamenhof kiuj ja estas iom malfacilaj. La ideo estas bona. Tamen mia memoro pri tiu verkita de Dr. E. Privat estas ke tiu prozo estas fortika kaj klara, kaj ne tiom malfacila. En tia broŝureto ne povus esti eĉ unu eraro. Nu, sur p. 9, linio 3 mi trovis tranloĝis; kaj sur p. 10, linio 17 mi trovis trotoaro. Alia rimarko: sur kelkaj paĝoj estas iom multe da literaturaĵo kaj iom malmulte da faktoj. Tamen rekomendinda.

**Interesaj artikoloj.**

**Prof. G. Waringhien: « La evoluo de la Esperanta vorttrezoro ».**

Ni speciale atentigas tiujn inter niaj legantoj kiuj volas funde koni kaj studi nian lingvon, pri tiu konferenco de la eminenta esperantologo, nun kiel artikolo publikigita en « Monda Kulturo », aùtuno 1964. Li tuŝas i.a. ankaù la problemon de la neologismoj, kiu vere ne estas simpla. Alia afero : multaj jam demandis al ni « Kial publikigi, en la sama jaro, du tradukojn de Hamlet?! » (de Dr. Zamenhof; Editions Franç. d'Esp.; kaj de Newell; « Stafeto »). Nu, la respondon oni trovas tute je la fino de la menciita artikolo.

**Interesaj revuoj.**

**« Homo kaj Kosmo ».**

Tiun-ĉi fojon ni volas atentigi niajn legantojn pri alia tre interesa, popularscienca revuo, kiun verkas aro da junaj Jugoslavaj astronomoj-esperantistoj; kaj kiun eldonas la Astronomia observatorio en ZAGREB ; Opatička 22 - Poŝtfako 165 Jugoslavio.

Ĝi aperas kvaronjare kaj abono kostas 1.30 Us. Dol. aù 18 steloj. Adreso por Belgujo: Alberto Fernandez, Steenakker 13 GENT. Poŝtĉeknr. 1010.24. Por ke vi havu ideon pri la enhavo, jen tiu de nR. 4 de 1964 Artikoloj. « Kiel oni elpesis la teron » - « Kiamaniere ekestis la mondo » - « Trafu la lunon ». Rubrikoj. « Vidindaĵoj en la ĉielo » - « Novaĵoj el la scienca mondo » - « Premia konkurso » kaj aliaj. Estas aferoj kiuj povas interesigi ankaù ne-astronomojn, kiel vi povas konstati. Plie ĝi estas tre plaĉaspekta. Oni fiere montru tion al ne-esperantistoj. Do, ni forte rekomendas !

**Dr. Pol DENOËL « Initiation pratique et théorique à la langue internationale ESPERANTO ». Nouvelle édition. Eldonis « Sonorilo », Kerklaan 61 Brugge en 1965. 120 paĝoj. Prezo 60 belg. Fr.**

Jen por ĉiuj Franclingvanoj tre bona studolibro. Antaŭparolo estas skribita de Germaine Wolff, normallerneja profesorino; troviĝas ankaŭ kelkaj opinioj de konataj esperantistoj. La papero estas fortika, pricipe la librokoverto, kaj la litertipo estas tre klara. Bildoj donas pliajn, videblajn klarigojn, kaj la gramatikaj formoj sur ili estas en koloroj. Do, ĉio plej okulfrapa. Sur aliaj paĝoj la esencaj vortoj aŭ formoj estas en kadroj presitaj. Jen alia metodo por devigi al plena atento. Krom la regulaj ekzercoj, estas ankaŭ ia familia kroniko por iel distre legigi kaj instrui la lernantojn. Tiu lernolibro estas komprenebIe ne kompleta. Tio estas ankaŭ ne ĝia celo. Ekzemple ni ne trovas ĉion pri la « tikla » uzo de la participoj -ata, -ita ; nek pri la uzo en ĉiuj kazoj de la poseda refleksiva pronomo « sia », kiu vere estas grava malfacilaĵo en Esperanto kaj kiu povas esti instruata nur en supera kurso. La kvalito kiu eble estas la ĉefa : kiam oni prenas la libron en mano, oni sentas ke estas agrable studi en ĝi. Ne necesas deziri bonan sukceson; tio estas jam certigita.

**« Islandaj Pravoĉoj ». Tri rakontoj kaj unu poemo tradukitaj de Baldur Ragnarsson, kaj eldonitaj de la « Eldona Societo Esperanto » el Malmö. 110 paĝoj.**

La Islanda poeto-esperantisto B. Ragnarsson, kiu jam tradukis kelkajn tiel nomitajn poemojn de Porstein Frå Hamri (poemoj kiuj havas nenion komunan kun poezio !), sed kiu ankaŭ verkis kelkajn originalajn kaj ĉi-foje tre belajn poemojn (« Ŝtupoj sen Nomo »; eld. de « Stafeto ») nun faras valoran servon al niaj movado kaj literaturo, konatigante al ni la Islandajn sagaojn kaj Edda-ojn. Tiu riĉa fonto de studmaterialo por la moralfilozofoj, devas esti konata de ĉiu homo kiu pretendas esti kulturhomo. Pro tio ne necesas traduki kaj eldoni ĉion. Kion tamen neniu legus ĝisfine. Sed B.R. faris tion laŭ ekzempla maniero : enkonduka artikolo pri konsisto kaj signifo ; tri ekzemploj de la unua kaj unu de la dua speco; notoj. Ĉio sur bela papero, en plaĉa, fortika enbindo. La Edda-oj estas pli patoso-ŝarĝitaj, estas pli nebulaj, ĉar prenitaj el la profundo de kaŝitaj pasioj kaj precipe de kaŝitaj angoroj. Tial ili estas ĝenerale malpli bone kompreneblaj. Sed ofte tre sugestaj kaj impresaj. Legu ekzemple sur p. 96, strofon 35. Mi ne povas diri ĉu la traduko estas bona, sed la nomo de B.R. estas garantio. Tamen ofte mi demandas al mi pri kelkaj vortoj - kvankam tuj kompreneblaj - kion la autoro **precize volas diri ?** Ekzemple: « Sam **ekfare** mastrumis sur Adalbol post la foriro de Hrafnkel » (p. 44) ? Alia ekzemplo : « Hrafnkel... forrajdis de la Asembleo kaj estis malkontenta pri la eliro de l'afero, ĉar li neniam antaŭe **tielan** spertis. » (p. 38)

Mi jam diris ke ne necesas kontakti la kompletajn sagaojn kaj edda-ojn. Sed mi tamen esperas ke tiu-ĉi libro havos tian merititan sukceson, ke tradukisto kaj eldonanto decidos eldoni pli ampleksan kolekton. Sagaojn kiel « Audun kaj la urso » ja ĉiu ŝatos legi. Drs. F.R.

**GRAVA SCIIGO.**

Kiel ĉiujare okazos en la kastelo de Grésillon, en la belega regiono de la Loire, internaciaj kulturaj ferioj por la esperantistoj. Ili estas jam famaj kaj pli kaj pli vizitataj. Tiun-ĉi jaron ili okazos de la 25a de julio ĝis la 8a de aŭgusto. Okazos en tiu kadro multaj turistaj ekskursoj, al la kasteloj de la Loire, al urboj kiel Angers, al la son-kaj lumludo en la kastelo de Le Lude (eble la plej spektakla kaj plej bela ludo inter ĉiuj samspecaj). La konferencoj estos donataj de plej famaj esperantistoj. Juĝu mem : Vilho Setälä el Finnlando pri la « Kulturo de la Kalevala », kaj pri la popolpoezio en Finnlando; ankaŭ pri la lando mem. Prof. Duc Goninaz el Parizo pri la « Dramaturgio de Puŝkin ». « La verkaro de Sandor Szatmari », « La sekretaj sonetoj de Peter Peneter », kaj pri « Ortografio kaj fonetiko ». Estimeble Dr. Bormann el Germanujo parolos pri ekonomio. S-ino Cheverry pri « Nobeloj kaj nenobeloj en la Franca mezepoka literaturo » kaj pri « Hodiaŭa Afriko ». S-ino Roux pri « De la lingvo al la informado ». Plie la vesperoj estos agrabligataj pere de filmo danco, societludoj ktp. ktp.

La kastelo estas modernigita; kaj estas pli da loĝebleco. Tamen rapidu por anonci vin, ĉar povas esti ke oni devos rifuzi, se vi tro malfruas. Ĉiujn informas donas S-ro Micard Kastelo Grésillon BAUGE (Mainet et Loire) France.



# GRUPA VIVADO

**ANTVERPENO ESPERANTO-GRUPO « LA VERDA STELO »**
**Kunsidoj : Ĉiuvendrede en « Witte Leeuw » Frankrijklei, 4 je la 20,15a h. Poŝtĉeknumero : 726.54 Deurne.**

**HONORIGO**

Kun ĝojo ni povas anonci ke nia Vic-Prezidanto, S-ro H. Sielens, estis honorigata per la kavalireco en la ordeno de Leopoldo.

Ni korege gratulas nian bonan amikon kaj fidelan membron pro tiu honorigo kaj emfazas kun plezuro en tiuj bondeziroj la afablan edzinon.

La 12an de februaro S-ro R. Balleux kun sia nepo S-ro Wim Verdyck flegis eksperimentan vesperon kun stereo-muziko. Estis novaĵo kiu bonege sukcesis. Helpe de magnetofono kaj 2 laŭtparoliloj ambaŭ organizantoj agrable surprizis la ĉeestantojn per la preskaŭ perfekta reprodukto de muzikaĵoj, orkestroj, aviadilbruoj, k.t.p. Per tre ŝatata kviso kiu ege okupis la aŭdantaron oni konkludis la vesperon en gaja atmosfero. Gratulojn al la organizantoj de tia vespero !

La 19an S-ro F. Jacobin, kiu faris kelksemajnan vojaĝon en Hispanujo, profitis de tiu okazo por paroladi pri siaj travivaĵoj en tiu sunplena lando. Per multnombraj lumbildoj li agrabligis sian raportadon kaj kreis sferon kiu vere instigis al entrepreno de sama vojaĝo !

La 26an en la kadro de E.K.I. kaj laŭ iniciato de BEFA (Belga Esperantista Fervojista Asocio) el Bruselo, S-ro L. De Bruyne, landa sekretario, akompanata de sia afabla edzino, kaj de sia helpanto, S-ro Steenhout, paroladis pri la Internacia Fervojista Filmservo kaj prezentis interesplenan sonfilmon « 125 jaroj poste », esperante parolata de S-ro M. Jaumotte. Ĝi pritraktis la evoluon de la belgaj fervojoj ekde 1835 ĝis hodiaŭ. Debato post la prezentado permesis al diversaj samideanoj esti pli informataj pri la diversaj problemoj en la fervoja servo. S-ro L. De Bruyne lerte kaj sperte gvidis tiun debaton dum la sinceraj dankvortoj de la Prez. S-ro Jaumotte, havigis al la organizantoj de l' vespero agrablan memoron.

Dum la 5a de marto S-ro C. Borremans alkondukis la verdstelanojn al Berlino en sia parolado kies titolo « Berlino, dialogo inter Okcidento kaj Oriento » sufiĉe ilustris ĝian enhavon. Pluraj travivaĵoj donis al tiu parolado personan karakteron. Dank' al letero al Willy Brandt, urbestro de Berlino, la paroladisto akiris belegajn diapozitivojn pri la mondfama urbo kiujn li montris kaj komentariis kaj krome akompanigis per bela muziko.

La 12an, denove en la kadro de E.K.I. (Esperanto-Komitato Intergrupa) ± 70 geesperantistoj kaj simpatiantoj, gvidataj de gaja harmonika muzikisto, vizitis la faman antverpenan pulĉinelan kelon kaj ĝuis agrablan vesperon en folklora atmosfero. S-ro H. Vermuyten prizorgis la prologon en Esperanto, prikantante la gloron de la teatro kaj de ĝiaj nenereeblaj artistoj. Tiuj ĉi lastaj zorgis ke « La Marbatalo de Palestino » kaj « La Frizisto de Sevilla » ankoraŭ dum longa tempo restados en la memoroj.

La 19an S-ro H. De Roover paroladis pri la fama artpentristo El Greco. Altnivela parolado kiu, helpe de artaj lumbildoj, pli bone klarigis al la publiko la emociplenan vivon de tiu mondfama artisto.

Dum la distra vespero de la 26a S-ro C. Borremans kantigis la tutan ĉeestantaron kaj dum kviso, kiu seksvis, 3 grupoj el la publiko akre batalis pri ĉiaj temoj. Jonglisto, S-ro Heremans, filo de S-ino A. Slootmans, forte mirigis la aŭdantojn pro sia vigleco. Liaj lertaĵoj sin manifestis en la multaj numeroj kiujn li prezentis seninterrompe ; sekve li plene meritis la laŭdajn vortojn de la Prez. kaj la varman aplaŭdon de la publiko.

Denove en E.K.I. kadro dum semajnfino de la 27a kaj 28a Esperanto-ekspozicio estis organizata en la festsalono « Sfinx » en Merksem. Okazis en kunlaboro kun la filatelia klubo « Mondo ». Pli ol 200 vizitantoj, inter kiuj multaj informpetis pri Esperanto. Diversaj gazetoj favore kaj amplekse raportis pri ĝi.




RABATO POR ESPERANTISTOJ

La 2an de aprilo S-ino J. De Hondt paroladis pri tre aktuala temo : « La Vivo de Etuloj en Infanvartejo » kaj ĝin ilustris per diapozitivoj kaj filmoj. Estante spertulino sur tiu tereno, ŝi plej facile montris la mirigan evoluadon de la instrumetodoj en la infanejo kaj faris trafan komparon inter la pasinteco, la estanteco kaj la eblecoj de morgaŭ. Plene sukcesinta vespero.

La 9an parolado kun diapozitivoj pri « Britujo » de angla samideano S-ro Norman Williams estis anoncata. Li estis gvidanto de 40-infanriĉa aŭtokaravano kaj profitis de haltado en Antverpeno por viziti la grupon. Pro diversaj malfacilajoj (en Anglujo la nebularo, en Belgujo la doganistoj kaj ankaŭ vojperdiĝo) li tiel ege malfruiĝis ke li nur povis fari sian paroladon en « telegram-stilo ». Malgraŭ tio ĝi estis ĝuinda. Pluraj infanoj de la karavano vizitis la kunvenon.

**BRUĜA GRUPO ESPERANTISTA,**
**Reĝa Societo**
**Poŝtĉekkonto N° 4835.33**

Leciono de la elementa kurso estis donata dum la unua horo de ĉiu kunveno, kies tagordo ne postulis la tutan vesperon. Krom tio jenaj programeroj estis plenumataj :

La 2an de marto, ne okazis kunveno pro Karnavalo.

Lernigaj ludoj okazis la 9-an en la kadro de la supera kurso. Parolado pri la « Jaro de Internacia Kunlaboro » estis farata la 16an de la prezidanto. La 23-an okazis plia kunveno de la L.K.K. por nia kongreso en Oostende. Alia leciono de la supera kurso okazis la 30an per dikto kun korektado kaj klarigado.

La 6an de aprilo, kelkaj eltirajoj el la lastaperinta numero de « Sonorilo » estis laŭtlegataj kaj komentariataj.

**PROGRAMO POR**
**ESTONTAJ KUNVENOJ :**
**Ĉiumarde, je la 20a en « Strijdershuis », Hallestraat, n° 14, Tel. N° 347.98. Dum la unua horo : leciono de la elementa kurso ; dum la dua horo :**

JUNIO :

1-an: Lastaj aranĝoj por la Belga Kongreso Oostende.

8-an : Generala raportado pri tiu kongreso.

15-an : Debato : Libertempaj projektoj.

22-an : Demandkonkurso, Sro. D. Demeulenaere.

29-an : Parolata gazeto.

JULIO :

6-an, 13-an, 20-an kaj 27-an : Libertempa programo, diskonigota per cirkulero.

**REĜA ESPERANTISTA**
**BRUSELA GRUPO**
**Kunsidoj : ĉiulunde en «Monico Nord» 2, Brabanto strato (Rogierplaco) Bruselo-3.**

La 1-an de Februaro, okazis la parolata ĵurnalo, (grupo B). Akiris plej multe da poentoj, Sino Arnold J. por la temo « Kiamaniere du germanaj soldatoj angliĝis nur dum mallonga tempo » kaj S-ino Daems, M. estis la laŭreatino por la elektita temo « Profesia Teatro por Surdmutuloj »; la 8-an: S-ro van der Stempel, D.; daŭrigis sian ĉiumonatan perfektigan kurson kaj dum la sama vespero, nia prezidanto S-ro Jacobs prezentis al la gemembroj novan grupakirajon t.e. Projektaparato. La 15-an ni festis nian jaran kermeson kaj la 22-an la gemembroj grupope debatis pri la « Evoluo de nia movado en nia grupa rondo ». La temo estis tiel vasta ke ni ne sukcesis ĝin elĉerpi ĝis la konkludo kaj nia prezidanto decidis ke la temo estas daŭrigota.

La 1-an de Marto la parolata ĵurnalo



**GRAVA noto de la Redaktoro.**

Tute normale kaj tute rajte povas okazi ke iuj legantoj ne akordiĝas ĉu kun artikolo(j) ĉu kun recenzo(j) ĉu kun la ĝenerala enhavo de nia revuo. Ili sciu ke la verkinto responsas pri tio (kaj la redaktoro pri la enhavo ĝenerale) sed tute ne la prezidanto de nia organizo. Ni ŝatas nenion pli ol reakcio je tio kio aperas en nia revuo. Sed estas iom strange ke tiuj reakcioj alvenas ĉe nia prezidanto (almenaŭ se ni povas kredi onidirojn; ĉar efektive ni vidis neniun skribitan reakcion) kaj ne ĉe la redaktoro aŭ unu de la verkintoj. Tio estas ne la normala vojo nek la normala agmaniero. Tio estas ankoraŭ despli stranga se oni memoras ke je nia cirkulero de 20-3-'64 al la grupvidantoj, envenis nur laŭdoj kaj konsentoj... (kvankam, vere, ankaŭ nur buŝaj!). Do, nia demando: se vi jam skribis, en rilato kun iu publikigajo de nia revuo, ĉu ankaŭ ni povas ricevi kopion de via skribajo? Se vi nur parole kritikis aŭ eĉ protestis pro iu publikigajo, ĉu vi bonvolas meti viajn argumentojn sur papero kaj sendi tion al ni? Vi faros servon al ni kaj al nia revuo. Dankon, dankon, dankon !

Drs. F. Roose

---

de la (A) grupo. S-ino Staes, E. akiris plej multe da poentoj por la temo « Epilepsio » kaj estis ankaŭ la sama titolo kiu estis elektita kiel debat-temo. La 8-an nia prezidanto S-ro Jacobs vidigis al ni, pere de epidiaskopa aparato plurajn seriojn da poŝtkartoj el eŭropaj kaj ekstereŭropaj landoj. La ĉeestantoj devis lokigi la bildojn laŭ landoj kaj laŭ lokoj. La 15-an ni aŭskultis la lecionon fare de S-ro van der Stempel, D. La 22-an S-ro Castel, H. prelegis malnovan sed ĉiam interesan temon pri « Hitler Monfalsisto » kaj la 29-an S-ino Fighiera organizis « Muzika vespero ». Tiuokaze ŝi aŭdigis dolĉan kaj ĉarman muzikon de la pola komponisto Henriko Wieniawski.

**Programo por estontaj kunvenoj:**

La 24-an de Majo: Parolado de S-ro Kanoniko Gillet. Temo fiksota.

La 31-an de Majo: Debat-vespero pri la Evoluo de Esperanto.

La 7-an de Junio: Ne okazos kunveno pro Pentekosto.

La 14-an de Junio: Raportoj pri La Belga Kongreso. (S-ino Fighiera).

La 21-an de Junio: Perfektiga kurso de S-ro van der Stempel, D.

La 28-an de Junio: Epidiaskopa vespero, fare de S-ino Fighiera.

**HELSINGOER**

**La 18.-25. de julio okazos la internaciaj feriaj Esp-kursoj (perfektiga - konversacia - kaj prepara kurso por naturmetodaj instruontoj) en La internacia Altlernejo en Helsingör (Danlando), belega loko kun parko kaj ĉe banstrando. Ĉiuj kore bonvenaj. Senpaga prospekto havebla ĉe**

**L. Friis,**
**Ingemannsvej 9,**
**Aabyh∅j, Danlando.**

**EREMBODEGEM - TERJODEN**

En 1964 okazis granda informa kunveno organizita de la studenta grupo de Denderleeuw, « Patrino Ŝiptiristino », en la urbdomo de Aalst. Paroladis tie Drs. F. Roose kaj S-ro Gr. Maertens el Brugge. Sekvis kurso, gvidita de S-ro De Bondt el Aalst. Dudekkvin ĝis la fino, lernis la lingvon kaj dudek poste pasis ekzamenon de simpla kapableco. Nun ekzistas tie grupo kiu kunvenas unu fojon en la monato, dimanĉmatene. Agado: perfektiĝo en la kono de esperanto. Oni planas novan kurson, ĉar anoncis sin sufiĉe multe da interesiĝantoj.

Adreso: L. De Schrijver, Stationsstraat 168, Haaltert.

**KARLOREĜA GRUPO ESPERANTISTA CHARLEROI**

**Raporto pri la Generala Kunsido de la 18-a de Februaro de 1965-a**

La 18-an de Februaro okazis en la Urbdomo de Karloreĝo, la Generala Kunsido de K.G.E.

S-ro R. Paulus, eksiĝanta prezidanto, prezidis la Kunsidon: li submetis la kontojn al la ĉeestantoj kiuj aprobis ilin, same kiel lian moralan raporton.

**Elekto de la nova Komitato:**

Jen la nova Komitato elektita unuvoce:

Prezidantino:
ORSOLINI Andrée,
6, rue Paul Pastur, Charleroi
Sekretario-Kasisto:
PAULUS Raymond
Publikaj rilatoj kaj Kursgvidanto:
DEVILLEZ Marcel

LES ENTREPRISES
DERKS
226, Rogierstrato, BRUSELO 3
Tel. : 16.89.92
Entrepreno de
KONSTRUAĴOJ

Kursgvidanto:
DELFORGE Marc
Komisario:
MARCOUX Guy

Dum la fina debato, S-ro Delforge petis helpon por la grupo de lernantoj kiun li provas starigi en Lobbes.

K.G.E. konsentis helpi tiun grupeton postulante ke almenaŭ parto de la lernantoj aliĝu K.G.E.'n.

Tiu helpo konsistus el propaganda materialo, okaza partopreno al la lecionoj, invito al niaj manifestacioj.

F-ino Orsolini, nova prezidantino, parolis pri la Jaro de Internacia Kunlaboro kaj klarigis sian opinion; unue ni devas kunlabori inter belgaj samideanoj: plifortigi la kontaktojn kun la membraro, agadi kaj propagandi sur belga kampo, disvolvi la kontaktojn inter niaj kaj landlimaj kluboj.

**LIEGO**

**Esperanto en la universitato de Lieĝo.**

En 1964 fondiĝis en la « Maison Africaine » (= Afrikana domo) la Lieĝa Esperantista Grupo Universitata, « LEGU ». Fondintoj: Jeanine Chaîneux kaj Serge Denoël. Ĉi-jare la kunvenejo estas la « Maison des Etudiants » (= Domo de la studentoj), Nr. 9, Rue Sœurs de Hasques. Laĉefa agado de la grupo konsistas el kursoj. Ili okazas ĉiun mardon je la 19a horo.

La lernantaro estas vere internacia: 1 Tuniziano, 1 Marokano, 4 Kongoanoj, 1 Greko, 1 Ruandano kaj 1 Arabo, el Seuda Arabio. Jen la estraro: Prezidantino J. Chaîneux (Belgujo); vicprez. Abdul Rahman Khayat (Seuda Arabio); kasisto Al. Kandolo (Kongo) kaj sekr. André Heck (Belgujo).

La grupo havas rilatojn kun I.S.A.E. (= Scienca Asocio) kaj kun « Stelo » (= studenta Asocio); ankaŭ kun T.E.J.O. kaj kun UEA pere de B.E.J.A. kaj la G.E.F. Antaŭ nelonge ĝi ricevis apogon de S-ro P. Natalis, profesoro pri pedagogio. Kvar membroj kaj unu simpatianto (3 Kongoanoj kaj du gebelgoj) partoprenis la B.E.J.A.-kunvenon en Namuro. La 13-an de aprilo, LEGU organizis renkontiĝon inter siaj studentoj kaj la esperantistaj studentoj de la gimnazio (= Athénée royal) de Verviers.

LEGU esperas ankaŭ havi reprezentanto(j)n en la kongreso de Oostende. Ni deziras fruktodonan estontecon al LEGU, kaj esperas ke tiu fondo instigos aliajn al fondo de samaj universitataj esperanto-rondoj.

**LIEGO**

**« Lieĝa Grupo Esperantista ».**

Pro iaj malfacilajoj, la memorverspero Zamenhof povis okazi nur sabaton, 9-an de jan. en ĉeesto de 40 personoj. Inter la memorindaj kunvenoj ni notu tiun de 24a de marto, kiam, post diapozitivoj de S-ro Kuster rilate al vojaĝo en Francujo, Serge Denoël prezentis bildojn pri novaj fiŝoj, vivantaj aŭ ne, en la akvariejo de Liège. Ankaŭ la kunsido pri « Oficialaj poŝtmarkoj kaj aliaj dokumentaĵoj poŝtaj pri Esp. » havis grandan sukceson. Kompreneble ne indas noti ĉiujn kunvenojn. Ni tamen volas ankoraŭ mencii gravan kunvenon, bedaŭrinde sen fina sukceso, kiu okazis la 10-an de feb. t.e. komuna kunveno de Lieĝa grupo kaj la Lieĝa Kat. grupo Esp. La kunveno estis interesa; sed ni ne povis solvi aferon kiu iĝas por ni streĉa: la afero de kunvenejo. Nunmomente S-ro Dr. Denoël disponigas sian atendejon; sed tio povas esti komprenebla nur provizora.

Jen la ciferoj pri la subskribkolektado por UNO. Individuaj: 587. Kolektivaj: 10 asocioj kun 3.817 membroj. Stato je 7.4.'65.

Eraro: En « Sonorilo » Nr. 1 de jan.-feb. Naskiĝis en familio Denoël, anstataŭ Christophe, legu Benoît.

LA REDAKCIO PETAS ENSENDOJN POR LA JULIA - AUGUSTA numero PLEJ LASTE JE LA 15.6.1965

manufakturaĵo firmo DE BROUWERE

Magdalenastraat, 29, Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216.54

# VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ
# " MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko

la perfekta konfekcio

fabrikita el plej bonaj svisaj teksaĵoj

Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj

## PRECIPAJ CENTROJ:

| | | |
|---|---|---|
| Antwerpen | : | Aalmoezenierstr. 2 |
| | | Abdijstr. 57 |
| | | Anselmostr. 17 |
| | | Nationalestr. 87 |
| Arlon | : | Marché-aux-Légumes 16 |
| Brugge | : | Breidelstr. 8 |
| Brussel | : | Galerie d'Ixelles 9 |
| | | Anspachlaan 194 |
| Eupen | : | Kirchstr. 14 |
| Gent | : | Brabantdam 25 |
| Herstal | : | Rue Large Voie 4 |
| Leuven | : | Bondgenotenlaan 29 |
| Luxembourg | : | Place de la Gare 67 |
| Mechelen | : | Grootbrug 8 |
| Roeselare | : | Ooststr. 124 |
| Tournai | : | Rue Royale 75 |
| Turnhout | : | Herentalsstr. 6 |
| Verviers | : | Pont St. Laurent 2 |


— Presita en Belgujo de H. De Baene-Sercu, Delaplacestraat 9, Sint Kruis Brugge —